Por plena sukceso ni deziras kontaktiĝi kun Esperantistoj en tuta Francio. La laboro estos senpaga, sed memkompreneble ĉiuj elspezoj faritaj por AZIMUTO estos repagitaj post la montrado de pago-pruvoj. Ankaŭ **senpagaj** estos la vojaĝoj por reprezenti la asocion en kongresoj, same kiel la manĝoj kaj la dormoj por la gvidantoj.

Esperante kalkuli vin baldaŭ inter siaj membroj, la AZIMUTO-teamo salutas vin tre samideane.


Corinne CHARTON, prezidanto de AZIMUTO,
Bernard AUNIS, sekretario.

ESPERANTO-TURISMO
31, Rue des Prés
F-68170 RIXHEIM

Por aliĝi al "AZIMUTO"
aŭ fariĝi gvidanto!
petu pliajn informojn

Tél.: 89 54 35 94
Télékop.: 89 66 54 04
Télex.: 881 858 COV

El: "De Natuurvriend"
("La Naturamiko")
aprilo 1990
Provinciestraat 53,
B-2018 ANTWERPEN



Tiu ĉi proksimume 100 jara maljuna fago havas, imagu, ĉirkaŭ 12 m da krondiametro. Per ĝiaj 600 000 folioj ĝia stabsurfaco de 120 m² deklubiĝas ĝis 1200 m² da foliosurfaco. Per la aerspacoj de la spongeca histo ekestas ĉelsurfaco por la metabolo de proksimume 15 000 m², do du futbalejoj! 9 400 litrojn aŭ 18 kg da karbondioksido tiu ĉi arbo prilaboras en unu suntago. Tio estas la meznombra karbondioksida rubo de du aŭ tri unufamiliaj domoj. Je titolo de 0.03 % da karbondioksido en la aero, ĉirkaŭ 36 000 m³ da aero devas flui tra la foliojn, kune kun ĉiuj bakterioj, ŝimsporoj, polveroj kaj aliaj malutilaj substancoj, kiuj pro tio grandparte restas en la folioj. Je la sama tempo la aero malsekiĝas, ĉar en tiu ĉi unu tago la arbo konsumas kaj ŝprucas ĉirkaŭ 400 litrojn da akvo. La 13 kg da oksigeno, kiujn la arbo produktas kiel rubprodukton de la fotosintezo, kovras la bezonon de 10 homoj. Por si mem la arbo produktas en la sama tago 12 kg da sukero, per kio ĝi konstruas ĉiujn siajn organikajn materialojn. Parton el ĝi la arbo amasigas kiel amelon, alian parton ĝi uzas por sia nova ligno. Se nun tiu ĉi arbo faliĝu por pli bone kultivi kampon, aŭ laŭ peto de aŭtomobilklubo, aŭ ĉar la arbo donas tro da ombro, aŭ ĉar precize tie devas esti konstruata laborilbarako, tiam ĉirkaŭ 2000 junaj arboj kun kronvolumo de 1 kuba metro devus anstataŭi ĉi tiun arbon.

Esperantigis: Hugo MARCHAND
Delegito pri ekologio
de "La Konko"

La kostoj por tio: 5 milionoj da belgaj frankoj!

Nekredeblas sed la organizantoj sukcesis loĝigi, gastigi, klerigi preskaŭ la tutan kongresanaron (350), krom kelkajn malfruajn aliĝintojn, en la vasta "Centro Pastorale Monsignor Carraro" kiu disponigis al ni ne nur la 1-, 2-, 3|4 litajn ĉambrojn sed ankaŭ grandan manĝo-salomon, kunvenĉambrojn, teatrojn, ktp. Nur la solena malfermo okazis en la "Blua Salono" de la urbo-domo.

La bonŝanculoj alvenintaj frue dum la vendredo profitis bonvenigan akcepton en la stacidomo mem (kun varma aŭ malvarma trinkaĵo!) kaj senpagan aŭtobuson ĝis la kongresejo (5 kilometrojn for...). La ceteraj preferis petis taksion, ĉar la urbo-busoj (kun la admono: "Nepre aĉetu bileton antaŭ la enbusiĝo" - sed malfacile oni malkovras la fakan biletvendejon-...) haltis ĉe la lasta ponto super la Adige, de kie, laŭ informoj antaŭliveritaj de la LKK, oni kapablas atingi la kongresejon ... "post kelkminuta piedpromenado"! Niaj lokaj samideanoj tutcerte viktimiĝas ankaŭ de la fama "Marsejla Suno" por uzi tiun optimistan aserton! Fakte nur kelkaj kuraĝuloj (devigite aŭ ne-) promenis tiel... kaj nur unufoje!

Komfortaj foteloj en la akcepto halo permesis nur al 20 homoj amike babili "kunsido". La 320 aliaj tenis "kunstarojn" atendante la horon de la manĝo aŭ de la forveturo por la enurbaj eventoj aŭ ekskursoj.

Divenu, kion ni -interalie- ĉiutage frandis ĉetabele... Jes, pastaĵojn! Ilin vi povis grandkvante engluti kun akompananta tomatosaŭco kaj neevitebla raspita Parmezan-fromaĝo. Miŝtera restos por ni la taŭga uzmetodo de la italaj "tranĉiloj"; dispartigi la matenajn bulketojn aŭ senŝeligi pomon kaj oranĝon postulis ian lertecon, kiun neniu kongresano sukcesis havigi al si eĉ je la 5a tago!

Grandan avantaĝon ni ŝuldis al la ega bruego, en kiu ni dronis dum ĉiu manĝo: ne eblis scii, ĉu la tablo-najbaroj krokodilis, aligatoris aŭ

kaimanis! Konfidence dirite, ni povis konstati aliloke, ke la itala krokodilado supervenkis la francan!

Nu, ĉiuj eroj de la proponitaj eventoj bonege disvolviĝis. Neniu povis mistrafi ion pro la bele prezentita kongresdosiero, kiun ĉiu ricevis: eĉ valora gravurita ŝlosil-portilo troviĝis ene, dum la virinoj malkovris etan speguleton kun surprisita nomlogo de la kongreso.

Eble iom fulme okazis la "kolektiva" urbo vizito sed multaj surgrimpis la ŝtuparon de la areno... (ege triste silentis Romeo sub la "bal-kono" de la strato Cappello... La foresto de lia kara Julieta akute dolorigis lian koron...). Sed pri la fulmo-tondro aŭtenta, kiu nuligis la paraŝutistan feston kaj la plenaeren koncerton ne kulpis la LKK^o! la "sen-pluv-ombrel-ul(in)oj" ĝuis ĝishaŭte la sanigan Veron-pluvon!

Ege "aristokrate" impresis la bankedo en la luksa hotelo "Leon d'Oro" kun la moderna, nova kuir-arto (vi scias... tre, tre larĝaj teleoroj...) kaj sincere entuziasmiga iĝis la spektaklo-balo, kiu postsekvis: geknaboj -eĉ tre junaj geknaboj- kaj gejunuloj prezentis per-fek-tajn demonstraciojn de klasikaj kaj modernaj dancoj! Multaj bankeduloj hezitis poste invadi la dancpargeton... sed for la skrupuloj! La bus-ŝoforo komencis malpacientiĝi, kiam eksonis la la matene!

Dankon al la tuta itala loka skipo, kiu frontis kelkajn malfacilaĵojn, plej kontentige solvis ilin, ebligante al ni travivi neforgeseblajn tagojn en Esperantio!

Romeo



EL NIA LETERKESTO...

"... Pri la titolo "**La Informilo**"...

Estas konate, ke la apostrofo (') montras la forigon de vokalo (Plena Ilustrita Vortaro, paĝo 60).

En Esperanto, oni rajtas elizii la vokalon "a" de la gramatika artikolo kaj la finan vokalon "o" de substantivoj (vidu "apostrofi", PIV, paĝo 60). - (Laŭ D^{ro} Zamenhof: "... Ĉiu povas kuraĝe uzadi, ankaŭ en la prozo, la formon apostrofitan".)

Por eviti ĝenan intermikson de la Esperanto-artikolo "**la**" kun la difinita virina artikolo "**la**" de la franca lingvo, estas konsilinde uzadi en esperanto-tekstoj la artikolon "**l'**" (sen la fina vokalo "a"). Ekz.: "**L'** patro kaj **l'** patrino"; france: "**Le** père et la mère". - Por faciligi la elparoladon de la mallongigita artikolo "**l'**" oni povus prononci "**il'**" anstataŭ "**l'**".-

Jen alia ekzemplo: "**L'** informadiko" (PIV), france: "**L'**informatique". Tial, ŝajnas konsilinde **anstataŭigi la titolon "**La Informilo**" per "**L' informilo**".**

A. Lienhardt - 68100 MULHOUSE

PS - Kun samideanaj salutoj ankaŭ al s^{ro} Colnot kaj la kun-laborantoj.



NANCY

VESPERAJ KURSOJ KAJ KUNVENOJ

Plu funkcias ĉiuj kursoj, la elementa ĉiumerkrede je la 19a; ni atingas la finon de "Junulkurso" (malfrue, ĉar pro la ferioj ni paŭzis multe pli ol kutime pro foresto de preskaŭ ĉiuj gelernantoj... 1 semajnon novembre, 2 decembre, 2 februare kaj 2 aprile...). La ĉeestanto de la kursanoj iom lamas post tiuj lastaj -printempajferioj, sed principe ankoraŭ 12 el 14 daŭrigas la lernadon. Ni tuj "atakos" "M 12".

La 3a-grada plu okazas marde je la 15a30, 2foje monate. La 2a-grada kurso okazas ankaŭ 2foje monate ĵaŭde je la 19a, alterne kun konversaciaj kunvenoj kaj studo de diversaj tekstoj (ĉefe aktualaĵoj el la magazino "Monato" kaj tekstoj de Raymond Schwartz). Ĉeestas ĝenerale 5 ĝis 10 personoj.

SABATAJ STAĜOJ POR KOMENCANTOJ

Entute nun 12 personoj aliĝis al tiuj staĝoj. Sed ĉar temas fakte pri intensiva lernado (krom la ĉeesto en la staĝo, la interesatoj devas relerni hejme ĉiun lecionon kaj verki la taskojn por ricevi perkorespondan korektadon), ŝajnas ke ne ĉiuj kuragos lerni ĝis la fino de la staĝoserio.

Okazis do staĝoj la 15an de februaro, 7an de marto, 4an kaj 18an de aprilo, 16an de majo. La lasta okazos la 20an de junio. La 16/5 ĉiuj staĝanoj ricevis provtekstojn de "Atesto pri Lernado" por eventuale trapasi la ekzamenon la 20/6. Verŝajne ne ĉiuj estos finpretaj, same kiel, cetere, la gelernantoj de la vespera kurso.

EKSPOZICIOJ EN LA NANCY-CIRKAUAĴO

Kun Henriko MOITRIER ni prezentis la ekspozicion pri Esperanto en la tiel nomata "Centre Intercommunal Laxou-Maxéville", de la 6a ĝis la 11a de aprilo. Kelkaj dekoj da personoj interesiĝis, sed nur 3 plenigis la demandaron por ricevi pli da informoj. La ĉefa tago estis la sabato 11a de aprilo, kiam okazis tie manifestacio kun ĉeesto de 250 personoj. La ekspozicion S-in° Roux kaj mi prezentis denove dum "Forumo de la Asocioj" en Vandoeuvre, la 1an de majo. ankaŭ tie kelkaj dekoj da vizitantoj ricevis prospektojn, nur 4 plenigis demandaron...

Neniu plia "palpebla" rezulto ĝis nun!

PERKORESPONDA KURSO

De septembro ĝis majo mi dissendis al la regiona gazetaro 74 komunikojn, kaj mi povis kontroli la aperon de nur 23. Kiel jam dirite la komunikoj aperis pli malfacile ci-jare kaj krome, plie, ili malpli efikas.

Ĝis la 12a de majo ni atingis la ciferon de 13 perkorespondaj gelernantoj. El tiuj kelkaj ŝajnas tre bone labori: ĝis nun 3 jam finlernis "M 11".

"Cielira" pieda ekskurso

Gelernantoj de la kursoj kaj stagoj de NANCY rendezuis la ĵaŭdon de la "Cielira Tago" (28an de majo) en la voĝeza vilago VEXAINCOURT. Venis partoprenantoj el La Bresse, Cirey-sur-Vezouze, Petitmont, Thionville kaj kompreneble NANCY. Entute ni estis 17 personoj.

Pluvetis frumatene, sed kiam ni atingis (piede) la lagon "Lamaix", la suno atendis nin. Ni promenis krome apud la lago, kaj post pikniko, revenis al la valo, el kie, aŭtomobile, ni vizitis la baraĵon kaj lagon de Pierre-Percée. Entute agrabla tagosen fulmotondro.

Ni planas estontan ekskurson: vidu alilokan komunikon franclingvan.

J.-P. COLNOT

Raporteto pri tio aperis en la lasta "Informilo", sed pro eraro aperis nur la antaŭnomo de la unua kurs-finanto. Do jen la kompleta listo de tiuj 3 finintoj, kiujn ni gratulas:

- 1/ S-r° Eric GUEUSQUIN - 57580 VATIMONT (gvidita de F-in° Roux)
- 2/ S-r° Armand HUBERT - 57200 SARREGUEMINES (gvidita de S-in° Busser)
- 3/ S-r° Robert ESCRIOU - 55300 St-MIHIEL (gvidita de S-r° Denis)

La 3 daŭrigas sian studon per "M° 12".

El la 23 gelernantoj de la pasinta jaro, 4a finlernis "M° 11": S-in° Michèle NARDI, 54800 JARNY (gvidita de S-r° Degrelle). Ankaŭ ŝi plustudas per "M° 12". Gratulojn!

INFORMADO EN NANCY MEM

Krom dissendo de komunikoj al la regiona gazetaro mi ankaŭ sendas mallongajn komunikojn al la lokaj gazetoj kaj radio-stacioj: 27 de post aŭtuno al la gazetoj kaj 11 al la radioj.

Interesa estis la rezulto, ke anonc-gazeto "Les Nouvelles" (senpage disdonita en la regiono de Nancy) aperigis intervjuon kun foto fine de marto. Ĝi estis la plej sukcesa de multaj jaroj: ĉirkaŭ 20 personoj entute telefonis aŭ skribis. Sekve al tiu intervjuo skriba, loka radio "Fajet" siavice intervjuis la 3an de aprilo. Sed ĉifoje ŝajne sen iu ajn rezulto.

KIAJ SABATAJ STAĜOJ EN OKTOBRO EN NANCY?

En la nuna lernjaro, malfacile mi povis startigi staĝojn por komencantoj: pro manko da interesatoj ili ekfunkciis nur februare, do iom malfrue.

Anstataŭe, mi provis funkciigi staĝojn por 3a-grada lernado, sed nur 3 personoj montris intereson. Mi planas por la venonta lernjaro funkciigi staĝojn por 2a-grada instruado. Sed 12 aliĝantoj estos necesaj. Ŝajne ne sufiĉe da homoj (el la nunaj komencantoj) estos pretaj lerni en tiaj staĝoj. Ĉu rea propono por komencantoj? Pluraj personoj montris intereson, sed evidentiĝis lastaŭtune, ke la intresigantoj de la printempo ne estas la samj kiel aŭtune aŭ vintre!

Do estos konkurenco inter la diversaj gradoj de lerneblecoj. Mi planas proponi la 3 gradojn kaj la grado, kiu la unua sukcesos arigi 12 aliĝojn vidos la efektivigon de la koncerna stagserio.

Por ke komencantoj bone komprenu pri kio temas, vi trovos aliloke informon franclingvan pri tiuj staĝo-eblecoj en Nancy. Mi precizigu, ke ŝajne homoj, kiuj venas unufoje monate ĝis Nancy por lerni parole esperanton, montras entuziasmon pli grandan ol tiu de la perkorespondaj gelernantoj.

BAR-le-DUC _____

Finiĝis la unuagrada kurso per plua "ek-studo" de la romaneto de Cl. Piron: "Gerda malaperis". Intertempe la plimulto el la staĝanoj de "IFV 55" (Institut des Forces de Vente) ricevis oficiale, el la manoj de F.-X. GILBERT, Direktoro de la CCI kaj... ilia e°-instruinto), sian diplomon de "Atesto pri Lernado" kune kun la oficiala diplomo de profesia staĝ-fino.

Grava evento okazis ankaŭ la 15/16/17ajn de majo: la "Forumo de la Asocioj" loĝis 47 el ili. Nia stando kaptis la intereson de sufiĉe da vizitantoj, inter kiuj sinsekvaj grupoj de geknaboj (vendrede, "tagon de la lernejoj"), okaze de "kultura ralio" tra la tuta Forumo.

Preskaŭ ĉiuj klubanoj deĵoris siavice dum la 3 tagoj. 11 personoj enskribiĝis por ĉeesti "prov-lecionon" (okazonta la 24an de junio, je la 20a30) kaj pluraj sciigis sian intereson por la perkoresponda kurso. Centoj da flugfolioj estis sisteme disdonitaj al ĉiuj preterirantoj..., kiuj ek de nun scias, kio estas esperanto!

Tri klubanoj ĉeestis la lastan Kultur-semajnfino en Homburg (Sarlando), unu ĉeestis la Eŭropan esperanto-Kongreson en Verona (Italio) kaj tri aliĝis al la venonta Universala Kongreso en Vieno (Aŭstrio).

La malfermo de la 1a-grada kurso 1992/93 estas programita la 7an de oktobro.

Nia klubo plue akceptos rusan prelegantaron, kiu turneos en Francio dum la sama monato.

MULHOUSE _____

Dekkvino da esperantistoj el Colmar, Mulhouse kaj Frejburgo renkontiĝis la 19an de majo apud Mulhouse en saloneto de la restoracio "Balladins" por aŭskulti prelegeton de Nevenka IMBERT, kiu revenis al Alzaco por ripozi de la streĉa milita etoso en Kroatio.

Antaŭ unu jaro nin gajigis ŝiaj pupoj; ĉi-jare sian rakontotalenton ŝi uzis por pentri al ni la malĝojon regantan en la eksa Jugoslavio, sed ankaŭ multajn ekzemplojn de kuraĝiga solidareco.

La diskutoj pluadis dum agrabla kunmanĝado, kiu, espereble, kontribuis al pligigo de Nevenka

Edmond LUDWIG

**.... NOVA KOLORA TURISMA PROSPEKTO PRI NANCY**

La nova prospekto pri NANCY en **ESPERANTO** estas presita. Skribu amase por peti ĝin, ĝi estas senpaga! Ĉu ne estus bona ideo sendi ekzempleron al viaj amikoj aŭ korespondantoj?

Franclingvanoj prefere skribu franclingve, sed bone precizigu: prospekto **en Esperanto!**

Ĉefe valoras mendoj el eksterlando kompreneble. Ŝajnas, ke la presita kvanto (1000) ne sufiĉos por elteni longan tempon.

Sukceso por Esperanto do, se la Turisma Oficejo devos baldaŭ eldoni novan kvanton.

J.-P. C.

EXCURSION EN MONTAGNE

Une excursion pédestre en montagne est envisagée pour le dimanche 27 septembre. Rendez-vous au col de la Schlucht (parking) à 10h. Repas tiré des sacs. Se munir de bonnes chaussures (de montagne ou de sport), d'un imperméable, de "lainage"... et d'un sac à dos.

Parcours du "Sentier des Roches", entre la Schlucht et le Frankenthal. Au minimum 4 à 5 heures de marche aller et retour. Déconseillé aux personnes ne pouvant marcher le temps indiqué ou sujettes au vertige.

Le parcours à pied n'aura lieu que si le temps est parfaitement beau. Si risques de pluie ou d'orage, excursion en voiture en Alsace (par exemple "route des vins").

Annoncez-vous à:

Jean-Paul COLNOT, 15 Rue de Lavaux, 54520 LAXOU
Tél.: 83 27 95 55

Mi ĉeestis la staĝon de VILLERS!

La unuan tagon, dekduo da gelernantoj progresantoj kunvenis en la klaso B. Post la prezentado ni komencis atente labori kun nia instruisto. Demandoj kaj respondoj sin intersekvis, interrompitaĵoj de kelkaj paŭzoj.

Du sinjorinoj aliris alian kurson, ĉar ili ne trovis sufiĉe interesa la re-lernadon... Ni laboris ĝis la deksesita.

Proksime estis librejo kaj loterio. Vespere, en la manĝejo, la etoso estis amika. La konversacioj en Esperanto devigis nin paroli... Tio estis instruiga!

Post la vespermanĝo, la pola mimartisto Jerzy Fornal estis tre aplaudita pro sia bonega spektaklo.

La duan tagon, samritmaj kursoj. Dum tiuj horoj la "Metodo 11" uzata permesis al ni relerni la "Junul-kurson" ĝis la leciono de la akuzativo.

Konklude: gelernantoj, **ne hezitu** veni al semajnfina staĝo! Tio-ĉi estas interesa kaj oni renkontiĝas kun gekamaradoj.

Odetta

Eĥoj el la kurso "A"

Nia simpatia amiko Roberto gvidis tiun kurson. Nur ses gelernantoj partoprenis: tri knabinoj (Karola, Odila, Lucia), unu juna Brazilano, Rahel, kies edzo plibonigas de post du jaroj siajn talentojn en Colmar.

Ankaŭ: du "iom malpli junaj ge-uloj" ĉeestis: mia edzino Lucienne... kaj via servisto Henriko!

Kvankam mi ne estas vera komencanto, mi ŝatis la etoson intiman de tiu kurso. Roberto tre agreble miksis ŝercojn kaj seriozecon, tiel ke la tempo pasis tro rapide!

Danken al la organizantino, Madeleine Roux, kaj al Roberto!

Henriko

Pri nia 32a staĝo de parolata Esperanto...

"...Ĉeestinte la praktikan staĝon en Villers-lès-Nancy mi ne bedaŭras tiujn du pasintajn tagojn en bona etoso, kaj tie ni havis okazon perfektigi Esperante.

Unue mi estis kontenta renkonti malnovajn geamikojn, kiuj estis lernintaj kiel mi dum staĝeto gvidita de Sinjoro Cobrot la lastan jaron, kaj evidente dank' al tiu staĝo mi konatiĝis nun kun ankoraŭ pli da aliaj geamikoj, dum aŭ ekster la kursoj, aŭ dum la komunaj manĝoj.

Koncerne la kursojn dudeko da ĉeestintoj elektis kiel mi la "kurson por la praktikantoj", animatan de Renée Triolle, pri la fama romano de Nemere, "La blinda birdo". Tio estis tre interesa; bedaŭrinde mi ne povis legi tiun libron antaŭe. Estas vera rakonto pri subpremo. Du verkistoj renkontiĝis; la unua estas blankulo, la alia nigrulo. La blankulo volas iri al Suda Afriko por liberigi nigrulojn de la diktatora respubliko.

Mi sendube legos tiun libron kun granda intereso.

Por la estonta staĝo mi mendos al Sinjoro Roger Degrelle ĉion, kion mi bezonas por pli bone labori per antaŭa studado de la libro.

Vespere estis vere granda entuziasmo kun Jerzy Fornal, kiu interpretis la vivon de Mozart kun granda talento.

Ĝis la venonta staĝo!..."

Pri elstara vespero...

Post la alveno, l'unua angoro de aktoroj en esperanta medio estas la malkovro de la salono, en kiu ili rolos. La minimumo estis ĉi-foje garantiita: scenejo kaj ŝtupbenkoj por la publiko. malofta minimuma ludkomforto por esperantistaj aktoroj! Pri la resto zorgis Jerzy FORMAL mem, postrapida esploro de la staĝeja meblaro: sufiĉis antikva salonotableto kaj ligna kofro por kompletigi la de li kunportitan dekoracion, inkluzive la lumigilojn. Kaj jen pretis la Mozarta Ĉambreto por interpreto de "Wolfgangerrl", de Gunnar GALLMÖ.

La teatraĵo koncernas "...baraktadon, bataladon de genia artisto kontraŭ konservativismo kaj tradiciismo en la muziko. Ĝi prezentas ankaŭ indiferecon de pluraj el la regantoj, el la aristokratara koncerne tion novan, kion li prezentis. Ĝi enhavas momentojn el lia drama vivo, dum kiu ĉi geniulo estis devigata barakti kun malfacilaĵoj de la ĉiutaga vivo por vivteni sin kaj sian familion".

Jen la resumo de la aŭtorino, legita antaŭ la spektaklo, tial ke ankaŭ la komencantoj povis sekvi pli facile, des pli ke la elparolo estis tiel klara kaj preciza, ke ankaŭ ili devintus kompreni la tekston. krome horloĝpreciza aktorado perfekte alternis kaj kongruis kun la temilustra muzika akompano tra la verkaro de la majstro.

Jam la sperta mimo travideblis en "Wolfgangerrl" kaj sin plene liberigis en du malgrandaj pecetoj: "La ŝnurdancanto" kaj la "Iluziisto", antaŭ ol senbridiĝi dum la "Granda Koncerto"! Dum tiu majstra prezentado, eĉ la ĉeestantaj "palvizaĝuloj"* - nun senigitaj de la lingva baro-ĝuis la spektaklon, kion atestis la fina aplaŭdo.

Jen profesia laboro! Ni deziru al Jerzy Fornal sukceson tra sia turneo, eble eĉ ekstere de la esperanto-publiko.

Edmond LUDWIG

*"palvizaĝulo"= ne-esperantofono, laŭ fama Ŝerce - mulo en nia federacio!

Eliane

Ĝenerala Asembleo de la Federacio - Villers-lès-Nancy

Malfermo de la kunveno je la 14a10, far la prezidanto E. LUDWIG

Ĉeestas 14 personoj.

Morala raporto far la prezidanto.

La prezidanto salutas la membrojn, dirante ke li estas felica pro tio, ke la homoj laboras memstare en ĉiuj grupoj de la Federacio... permesante al li certagrade "riposi"!

Alvoko al iuj postemuloj por rapidigi oficialaĵojn.

Agadraporto (rilatas al la Federacio)

= presigado de nova libreto, la dua el la "avo-serio" -post la "ronkanta avo"-, t.e. "la Avo Fungo", verkita de S-r^o CLAUDEL, samideano el Vozejoj.

= dissendado de pli ol 600 franclingvaj "La Informilo"-bultenoj (diskutado pri ĝi en la parto "diversaĵoj").

= organizo de finsemajnaj staĝoj, kiuj venigas ĉiufoje inter 45 kaj 80 personojn. Tiu solvo efikas pli bone ol tiu de la pasintaj kongresoj federaciaj... kvankam la staĝantoj ne ĉeestas amase la "ĝeneralan asembleon" malgraŭ la ne plu organizo de "turisma promenado" dum la t.n. "A.Ĝ."

= agado de la grupoj: jen "paneo"... ĉar oficiala raporto ne estas en niaj manoj. Ĝi kuŝos en la tuj alvenonta n^o de "La Informilo". Ni aldonu, ke ĉiuj el ni povis malkovri tiun grup-aktivecon dum la jaro, kiu regule aperis en la aludita "Informilo".

Voĉdonado pri agadraporto de la Federacio: **por:** 13 personoj; **sindeteno:** 0. **kontraŭ:** 1.

Financa raporto

Nia samideano GROSSMANN, kasisto, laŭtlegas la erojn. La tuta financraporto ankaŭ kuŝas en la venonta "Informilo". Koncize: **en kaso:** 46 000 FF; inter ili 18 000 FF da "sikavoj" (Société d'Investissement à Capital Variable). Pridiskutado en parto "diversaĵoj". Voĉdonado: **por:** unanime.

Libro-servo

= enspezoj: 13 000 F; elspezoj: 9300 F; profito: 3700 F (en ĝi ĝiro de 1000 F al la Federacio).

= vendo dum staĝoj: 7700 F (4300F en Illzach, junio 91, 3400F en Merckwiller, oktobro 91)..

Voĉdonado: **por:** 12; **sindeteno:** 2.

Plua pridiskutado en la parto "diversaĵoj".

Fedracia bulteno: "La Informilo"

La redaktoro havas nenion speciale menciindan... krom fojan malfruon, kiun oni ŝuldas al la presisto (OCCE), superŝtita de laboro sed kiu strebas prilabori nian bultenon laŭpove.

Renée TRIOLLE, prezidanto de UFE, kiu ĉeestas kvalite de federacianino, emfazas pri la kvalito de la bulteno. Cetera gratulleteroj atingas la redaktoron dum la jaro.

Perkoresponda kurso

Tiu ero de la agadoj ankaŭ tre detale aperas en "La Informilo" dank' al J.-P. COLNOT.

Sendado de 63 artikoloj al la agazetaro regiona. Nur 20 aperis. Eta rezulto. 11 aliĝoj. 4 finlernis "M11". 1 "M12". Iaj komentoj: la PKK ne plu "bone" funkcias nuntempe. Ni proponu do "staĝetojn", kiuj certagrade efikas (10 interesuloj en NANCY kaj 5 en parolata kurso en Mulhouse).

Renovigo laŭstatuta de la Federacia Komitato

La mandato de P. DENIS kaj F.-X. GILBERT finiĝas. Ambaŭ rekandidatiĝas. 6 personoj povas aliri la komitaton. Kandidatiĝas Catherine GALLEGRO kaj Jean-Luc THIBIAS. Nenia sekreta voĉdonado postulata: la 4 kandidatoj estas elektitaj unuanime per manleviĝo.

Sekvas la elekto de la nova estraro:

Prezidanto: LUDWIG Edmond - 26, route de la Schlucht, 68140 STOSSWIHR

Vic-Prezidanto: COLNOT Jean-Paul - 15, Rue de Lavaux, 54520 LAXOU

Vic-Prezidanto: GILBERT François-Xavier - Vert Coteau, 55000 LONGEVILLE-en-BARROIS

Sekretario: GALLEGRO Catherine - 49, Rue du Gl De Gaulle, 57330 HETTANGE-GRANDE

Kasisto: GROSSMANN André - 5, Rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

Membroj: DEGRELLE Roger - 12, Rue Estienne d'Orves, 544490 PIENNES

DENIS Pol - 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR-le-DUC

KUENY Robert - 11, Rue de Battenheim, 68490 BANTZENHEIM

ROUX Catherine - Clos de Médréville, 11, Rue W. Churchill, 54000 NANCY

SCHEIDEL Odette - 35, Grand' Rue, 67660 BETSCHDORF

QUI FAIT QUOI
WHO DOES WHAT
KIU FARAS KION
WER MACHT WAS



album

106 pages couleur
sur papier glacé
format A4



NUMÉRO SPÉCIAL DE MEUSE ÉCONOMIQUE

N°125 - Février 1992 - 40 F

frais d'envoi: 15 FF

Un argumentaire de choix que chaque espérantophone se doit de posséder... et utiliser opportunément sans modération!

CCI de la Meuse, Parc Bradfer
F-55000 BAR-le-DUC

39a Kultura Semajnfino de SEL en Homburgo

Laŭ jam kutima programo disvolviĝis la 39a kultura semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo en Kardinal-Wendel-Haus en Homburgo inter la 1-a kaj la 3a de majo. La estraro de SEL denove sukcesis altiri per riĉa programo kaj renomaj nomoj preskaŭ 100 partumantoj el 10 nacioj. Inter ili estis ankaŭ novaj vizaĝoj, kaj spertuloj kaj komencantoj kaj junuloj; la infanojn prizorgis s-ino Takajo WALZ.

Okazis 4 diversnivelaĵoj lecionserioj; ĉiuj surbaze de certa libro. Sevda BARKOVIĈ gvidis la kurson por komencantoj. La kurson por progresantoj estris Kreŝimir BARKOVIĈ laŭ Raymond SCHWARZ, *Vole...nevole*, kaj Eddy BORSBOOM traesploris kun lingvaj spertuloj la stilistikon de la libro *Kun siaspeca spico* de la sama verkisto, paroligante ilin.

Por firmaj parolantoj de la internacia lingvo okazis seminario pri la temo *Lingvoscienco kaj planlingvoj - teoriaj kaj praktikaj aspektoj*. Prelegis d-ro Detlev BLANKE, Humboldt-universitato, Berlino, kaj Wera BLANKE.

Jen la titoloj de la unuopaj prelegoj:

1. *La lingvoscienco kaj ĝia sinteno al planlingvoj.*
2. *Pri la scienca valoro de planlingvoj, abarte de Esperanto.*
3. *Vortfarado de Esperanto kaj la germana specimeno el kompara studo.*
4. *Interlingvistiko kaj esperantologio: pri la objekto kaj aktuala situacio.*
5. *Kelkaj lingvaj kaj nelingvaj kaŭzoj por la relativa sukceso de Esperanto.*
6. Wera Blanke:
Terminologio en Esperanto - kelkaj aspektoj kaj problemoj.

Vendrede vespere, Claude MARTINE montris lumbildojn ĝiro tra Francio.

Sabate matene okazis vizito de romia urbo en Ŝvarcenaker (Schwarzenacker).

Post la sabata vespermanĝo trideko da kredantoj kolektis sin ĉirkaŭ la kapela altaro por kunfesti diservon gvide de pastro Albrecht KRONENBERGER. Ute HOEPPNER ludis orgenon kaj Sonja HOEPPNER ludis fluton. Denove montriĝis, ke la komuna diservo apartenas al la nepraj elementoj de la kulturaj semajnfinoj SELaj.

Sabate vespere okazis muzika programo. Saskia VEEN ludis harpon kaj Edward HOEPELMANN kantis. La ĉeĝuntoj spertis elstarajn artistojn. Neforgesebla.

Poste oni abunde kaj ĝismulte trans la noktomezajn horojn utiligis la eblon denove renkonti malnovajn gekonatojn kaj fondi novajn kontaktojn.

Dum la semajnfino funkciis libroservo. Barbara JANTZEN kaj Daniel DÖRR prizorgis ĝin. S-ro Oliver WALZ okupis sin pri la preparado de sonbenda dokumento kaj filmis videobende. Ambaŭ versioj estos haveblaj ĉe SEL. Denove estas menciinde la bona prizorgado de langoj kaj stomakoj danke al la kuirejo.

Okaze de la jam tradicia dimanĉa aperitivo la estro de SEL, Josef DÖRR, dankis al ĉiuj, kiuj kontribuis al la efiko de la programo.

Dolorige sentiĝis la manko de Maria BECKER-MEISBERGER (konata aŭtorino, dumviva membro de SEL), kiu grave malsaniĝis kaj estas en malsanulejo. Feliĉe ŝia sanstato intertempe iom pliboniĝis.

Bedaŭrinde ĉifoje ankaŭ nia honora prezidanto Günther BECKER ne povis partopreni. Lia kruro rompiĝis. Ambaŭ kuŝas en la sama ĉambro en la malsanulejo "Sankta Elisabeta" en Cvajbrukeno (Zweibrücken).

raporto ĉerpita el "Dialogo"
organo de Sarlanda Esperanto-Ligo

39a kultura semajnfino en Homburgo/Sarlando
Impresoj de nova esperantisto

"Ĉar mi eklernis Esperanton antaŭ tri monatoj, mi volis testi miajn novajn sciojn. Do, mi iris Homburgon kun mia edzino por **paroli** la internacian lingvon.

Antaŭe mi estis multe laborinta, multe lerninta per korespondado, tiamaniere ke mi povis konvene skribi esperante... sed ĉu mi estis lerta pri la **parolado**?

Ve! La Germanoj, kiujn mi renkontis, parolis Esperanton kiel sian gepatran lingvon... Ili parolis rapide kaj mi komprenis nur kelkajn vortojn tie kaj tie-ĉi. Kia disrevido! Plie, la kursestro, kiu gvidis la kurson, kiun mi partoprenis senĉese parolis... parolis... **parolis!** Mi ne plu sekvis la kurson, mi ne plu aŭdis la paroleon... Unuvorte mi **nenion** lernis... Sed eĉ se mi nenion lernis, mi tamen memorteris, ke mi nenion scias, ke mi ne scias **paroli**, ke mi lernis esperantan lingvon kiel malvivan lingvon, kiel latinan lingvon. Tial mi certas, ke mi devas ankoraŭ labori.

Feliĉe, dum tiu staĝo mi renkontis afablajn samideanojn kaj simpatiajn eksterlandanojn, kun kiuj mi povis tre simple kaj senpere ekkomunikiĝi per parolo. Sed mi devas ankoraŭ labori..."

Robert Escriou

La valoro de Esperanto

Tiu ĉi artikolo estas verkita de Claude Piron, lingvisto kaj psikologo, profesoro ĉe la Geneva Universitato.

Milionoj da junuloj lernas lingvojn, kun kosto de centoj da miliardoj da dolaroj, kaj, kiam ili fariĝas plekreskaj, la registaroj enabismigas samkvantan riĉaĵon en sian absurdan sistemon de internacia komunikado. En 1989, la kosto de la lingvaj servoj de la Eŭropa Komunumo, ekzemple, estis 1,4 miliardoj da ekuoj. Por la Komunumo la kosto de ĉiu presita vorto estas 36 usonaj cendoj; la kosto duobliĝis en dek jaroj.

Malgraŭ tiuj ĉi astronomiaj ciferoj, la komunikado estas tre malbonkvalita: oni parolas inter si per mikrofonoj kaj kapaŭdiloj; miskomprenoj kaj preterlasoj abundas; en la mondaj organizadoj multaj delegitoj devas esprimiĝi en lingvo, kiun ili ne plene mastras, kaj tial ili estas malavantaĝitaj en la striktaj intertraktadoj; la tradukado de la dokumentoj implicas ĝenajn tempolongojn. Tiuj, kiuj suferas tiujn ĉi malavantaĝojn, estas cetere privilegiitoj de la komunikado: reprezentantoj de ŝtatoj kun lingva dungitaro je sia servo. Por la ordinara homo la transnacia komunikado estas nula aŭ malaltnivela.

Ofte - ekzemple por turistoj, por kontaktoj inter kuracisto kaj paciento en lando, kies lingvon oni ne scias, por enmigrintoj - aperas ĝenaj aŭ dolorigaj problemoj kaj, anstataŭ ol honeste prezenti la situacion, oni kaŝas ĝin. Oni lasas kompreni, ke 1) ne ekzistas problemoj, la angla lingvo estas ĉie uzata; 2) oni povas ellerni la lingvojn en la lernejoj; 3) la malavantaĝoj de la nuna sistemo estas ne aparte gravaj; 4) estas neeble, aranĝi la aferojn

diversmaniere.

Ni respondas pri ĉiu unuopa punkto:

1) Se la povoscio de la angla solvas la problemon de komunikado, kial oni dediĉu tiom da miliardoj al tradukado kaj al interpretado? El enketo farita en ses landoj de Okcidenta Eŭropo, elmergiĝas, ke nur 6 procentoj de la loĝantoj reale komprenas ordinaran anglalingvan tekston. La argumento «angla lingvo» estas malvera mito.

2) La lerneja instruado de naciaj lingvoj ne portas al mastrado pri ili, ĉar, por havi mastradon pri fremda lingvo, oni bezonas enmemorigi kaj transformi al refleksoj centrilojn da detaloj ne havantaj racian pravigon. En Francio nur 1 procento de la lernantoj akirintaj abiturientecon kapablas senerare esprimiĝi en la lernita lingvo.

3) La monsumoj elspezitas por unu aktiveco ne estas plu disponeblaj por alia aktiveco. La ŝtatoj ne prikonsideras tiun ĉi verajon. Ili neglektas la fakton, ke tradukado kaj interpretado estas ekonomie kaj socie senfruktaj aktivecoj. La ŝtatoj membroj de la Monda Organizaĵo pri Sano, ekzemple, en la sama sesio, en kiu ili donis pliajn 5 milionojn da dolaroj al la lingvaj servoj, repuŝis pro manko de mono aron da realismaj, bone ellaboritaj projektoj, celantaj plibonigi la sanitarajn servojn en Afriko, kiuj bezonis nur 4,2 milionojn da dolaroj.

4) Kiam diverslingvaj homoj volas interkomuniki, ili povas elekti inter diversaj sistemoj, laŭ la diversaj situacioj kaj lingvaj kompetentecoj: gestoj, kriplaj frazoj, uzo de la angla, interpretado, Esperanto ktp... Se oni

studas la rilaton efiko/kosto por ĉiu unuopa sistemo, oni konstatas, ke unu formulo, kaj nur unu, ebligas optimuman

interkomprenadon, fronte al tre malalta investo je tempo, mono kaj energioj.

Tiu ĉi formulo tute forigas la koston de tradukado kaj de interpretado; metas la partnerojn sur la saman nivelon; implicas nenium prokraston; ebligas konfidencan komunikadon; favoras esprimfacilecon; respektas la etnan, nacian kaj kulturalan identecon de ĉiu unuopa; favoras la reciprokan ekkonon de la kulturoj; ebligas pli bone ol aliaj la spontanajn esprimon de la sentoj kaj la aŭtente homan interparolon inter diversdevenaj personoj. Tiu ĉi formulo estas Esperanto.

Justeco postulas, ke oni ne elmetu verdiktojn sen antaŭa profunda analizado de la faktoj. Sed neniam registaro ebligis al siaj civitanoj juĝi konante. Neniam registaro diris: «Ni uzas miliardojn elprenitajn el vi impostpagantoj por senfruktaj aktivecoj de tradukado kaj interpretado. Ĉu vi konsentas pri tio, aŭ ĉu vi preferas, ke ni dediĉu tiujn monsumojn al aliaj aktivecoj por plibonigi la bonfarton de la loĝantaro?».

Neniam registaro diris: «80 aŭ 90 procentoj el vi elektas la anglan kiel fremdan lingvon istruotan al viaj filoj, sed sciuj ke la plej granda parto de la lernantoj neniam kapablos uzi tiun ĉi lingvon: kontraŭe, se ni lernigus al ili Esperanton, post unu lernoĵaro (kun la sama kvanto da kursohoroj) ili povus ĝuste komuniki de unu lando al alia kiel en sia gepatra lingvo: la lingvaj bariloj ne plu ekzistus. Tiu ĉi instruado liberigus tempon, kiu ebligus al ili, en la postaj jaroj, ellerni lingvon, ne kiel tutmondan komunikilon, sed kiel kulturalan riĉigilon, por malkovri kaj penetri alian mensostaton, alian manieron pensi, senti, reagi».

Kial la registaroj ne diras tiajn aferojn? Kial ili kaŝas la veron? Ĉu ne alvenis la tempo, devigi ilin agi laŭ honesta kaj prudenta maniero?

Tiu artikolo, kiun ni ŝuldas al unu el la plej famaj esperantologoj, aperis en la gazeto eldonita de la "Radikala Partio", nova transnacia "partio", kiu oficiale kaj firme emfazas pri la valoro de Esperanto. La koncerna gazeto estas tradukita en 14 lingvojn... inkluzive Esperanton.

pour vous initier à la seule
vraie langue
internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...



DEUX RENDEZ-VOUS
A NOTER SUR VOTRE AGENDA

34ème STAGE d'ESPERANTO PARLE
de notre Fédération
3 et 4 octobre 1992
F-57330 HETTANGE-GRANDE

40a Kultura Semajnfino
de Sarlanda Esperanto-Ligo
D-HOMBURG = 4/6ajn de decembro

➔ nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...



Internacia Esperanto-Kongreso por la pli aĝa generacio

"NE HEZITU!...
Vi ankoraŭ povas aliĝi
dum la tuta monato julio!"

5.-12. septembro 1992 en Augsburg

Augsburg, junio 92,

"...Ni ofertas internacian Esperanto-Kongreson **sen movada hasto**, kongreson de amikeco kvazaŭ aŭtenta **Ferio-Semajno**... Ni kompreneble akceptas **pli junajn Esperanto-Parolantojn**, kiuj foje volas renkonti homojn el diversaj landoj kaj regionoj, por komune travivi **senĝenan semajnon** en harmonio kaj reciproka kompreno... **Venu, rigardu, kaj ĝuu iom alian E^o-Kongreson!**..."

Petu nian belan, ilustritan **program-prospekton**: vi miros pri niaj antaŭplanitaj aranĝoj!..."

Hermann SCHMID

ALIĜILO

ESPERANTO-KONGRESO POR LA PLI AĜA GENERACIO de 5 - 12 septembro 1992
Kongresejo: Kolpinghaus Augsburg/FR Germanio - LKK: Esperanto-Press Augsburg
Kongreskonto: 44535-803 (Hermann Schmid) Postgirkonto München (BLZ 700 100 80)
Pago-celo: Esperanto-Kongress 1992 Augsburg - Adreso: Waterloostr. 21 D-8900 Augsburg

Kongreskotizo: 95 DM

Mi aliĝas al la kongreso kaj pagas la kongreskotizon de 95 GM
Mi ĝiras samtempe la antaŭpagon por la tranokto de 100,- GM GM
la kostojn por la ĉambroporado de 5,- GM GM
La sumon por la dumkongresaj manĝoj de 180,- GM GM
Mi kontribuas al la solidara fonduso per la sumo GM
Mi partoprenas la tutagan ekskurson al Neresheim - Aalen (30,- GM) GM
Mi partoprenas la duontagan ekskurson al Pfaffenhofen (Lupolregiono) 20,- GM
Mi partoprenas la duontagan ekskurson al princa kasteło Batenhausen 15,- GM
Mi estas vegetarano sumo entute: GM

S-ro/S-ino

Nomo antaŭnomo telefono
poŝtkodo loĝloko strato
lando dato subskribo

La kongreskotizo samkiel ĉe aliaj kongresoj ne estas repagebla. Pri asekuro ĉiu partoprenanto respondecas por si mem.

Pri ekskursoj: Ni planas tri ekskursojn, tutagan kaj du duontagajn. La tutaga ekskurso kondukas al la abatejo Neresheim kun mondkonata barokstila preĝejo kaj al Aalen. Aalen estas konata i. a. pro la limca-muzeo; kaj nun troviĝas en tiu urbo la Esperanto-biblioteko de l' Germana Esperanto-Instituto de GfA.

La celo de duontaga ekskurso estas Pfaffenhofen, kiu troviĝas en la lupolregiono; tie ni havu vespermanĝon kaj folkloran programon. La alia duontaga ekskurso gvidas nin al princa kasteło (fugger-kasteło) en Babenhhausen.

Estimata kongresan(in)o!

Kelkaj vortoj pri aliĝo kaj samtempa pago. Luj agenda ĉe la aliĝo estas la aliĝotizo, ĉambroporadkostoj kaj la antaŭpago por la tranokto. La aliajn sumojn vi povas tuj pagi, ĉar tiamaniere vi faciligas la laboron de LKK, sed ne estas deviga.

Tiu aliĝilon vi plej urĝe sendu al: **ESPERANTO-PRESS** (Hermann SCHMID)

Waterloostr. 21, D-8900 AUGSBURG

" Kara Samidean(in)o,

Certe vi aŭdis pri la beleco de NICO kaj ties regiono. Se vi volas pli multe scii pri tiu vizitinda regiono, bonvolu peti turisman prospekton (esperantlingve aŭ iel ajn lingve) al:

Office de Tourisme

1, Esplanade John Kennedy,
F-06000 NICE

Kiel vi eksciis post apero de nia komuniko en "La Informilo" (n°77), ni planas krei en NICE, **Esperanto-Domon** por la E°-lingvanaj turistoj... Tial ni lanĉis kampanjon, por kolekti la necesan sumon, sub formo de "kuponoj", kiuj fakte estas nur antaŭpago de via venonta gastiĝo en la celata domo: kiuj jam aĉetintos kuponojn, tiuj pagos sian restadon per aĉetitaj kuponoj. ...

Nun, **neniu sendas monon** sed nur promesas tion fari, sendante nur plenigitan sindevontigilon. ...

Tiu projekto devas esti plej baldaŭ realigita. Jam **pluraj centoj da kuponoj** estas antaŭmenditaj! Se komence de 1993 la nombro de rezervitaj kuponoj estas sufiĉe alta, ni daŭre klopodos por realigi tiun klopodon. Se ne, tion bedaŭrante, ni **rezignos**.

Bonvolu plej baldaŭ sciigi, ĉu tiu **Esperanto-Domo** interesas vin!"

La respondeculo: R. LLORENS

PS - Se vi ne plu posedas la specifan detalan cirkuleron ("La I° n°77), petu ĝin ree al nia adreso:

Nice-Esperanto
"Les Hortensias 2", 121 bis, Bd Napoléon III,
F-06200 NICE

URGAS!

===== noto de la redaktoro:

la ĉi-supra alvoko estas resumo de la duaĝa cirkulero, kiun ni denove ricevis de S-ro Llorens

ĈAMBROMENDILO

por la ESPERANTO-Kongreso 5 - 12 septembro 1992 Esperanto-Senioren-Kongress
kongreso por la pli aĝa generacio

Mi mendas unulitan dulitan ĉambromendon en la kategorio A B C plurlitaj (Bonvolu signi la validan) ĉambroj) (nur du-kaj ĉambroj)

por la noktoj: 5/6 6/7 7/8 8/9 9/10 10/11 11/12 de septembro 1992

Nomo kaj antaŭnomo _____ eventuale iel. n-ro _____

strato kaj numero _____ poŝtkodo _____ loĝloko _____

_____ dato _____ subskribo _____

Mi deziras loĝi kun S-ro/S-ino: _____

La prezon por la ĉambro mi pagos post la alveno en Augsburg, minus la antaŭpagon.

La ĉambromendo estas deviga! Se vi pro grava kaŭzo ne povus partopreni la kongreson, bv. tion anonci se iel eblas tagon antaŭe, ĉar ne malmendita ĉambro estas pagenda!

Se ĉambro en la mendita kategorio jam estas okupita, mi akceptos la venontan kategorion.

Mi alvenos per: aŭtomobilo / fervojo / aviadilo, la _____ 1992

En kazo, ke vi deziras alveni pli frue aŭ resti pli longe, bv. tion komuniko kun la mendo de la ĉambro.

Rimarkoj: _____

===== Kasedoj =====

Mi ĵus akiris novan kasedo-registrilon, tial mi povas proponi al vi kopion de diversaj prelegoj, konferencoj, muzikaĵoj, kiuj rilatas al Esperanto. La kvalito de la registradoj, plej ofte neprofesiaj, dependas kompreneble de la originalaĵo. Jen listo de proponitaj registraĵoj:

- 1) Journée d'étude sur l'Esperanto, 25.11.83 Université Paris VIII Vincennes à Saint-Denis. Kasedoj 2x90 mn.
- 2) "Kial ne la Angla?" -lingvaj malavantaĝoj de la angla. Prelego de Doktoro John C.Wells en Pompidou-centro, 8.2.87. Kasedo: 1x90 mn.
- 3) Elsendo de France-Inter de la 27.9.87 unua-flanke. Dua-flanke: Radio Bleue intervjuas Henri Masson: 30 mn. Radio-France Nancy intervjuas J.P. Colnot: 10 mn. Kasedo: 1x90 mn.
- 4) Esperanto-kurso de France Inter en aŭgusto 1988. Kasedoj 3x90 mn.
- 5) Kantoj por infanoj. Unua flanko: Kantu Esperante: kun Janico kaj Johano 12 konversaciaj kantoj (San Diego, Usono). El Zagreba kurso: Ne Monon sed Amon. Senlaborulo. Vivu la Stel'. Dua flanko: Kantoj registrataj en Hungario dum Esperanto-familia renkontiĝo en 1988. Kasedo: 1x60 mn.
- 6) "La danĝera lingvo" Prelego de Ulrich Linz registrata okaze de la staĝo en Homburg en decembre 1989. Kasedoj: 3x90 mn.
- 7) Radio Dreieckland (tri-landa regiono) intervjuas s-rojn Kueny, Grossmann kaj Panchaud en la elsendo "A coup de bec". 15.4.90. Kasedo: 1x90 mn.
- 8) "Kial tiom da kontraŭstaroj al Esperanto en la ĝenerala publiko". Prelego de s-ro Piron, unua-flanke. Dua-flanke: Prelego de s-ro Piron pri Esperanto kaj la enkonduko en la lernejojn. Kasedo: 1x90 mn.
- 9) Radio Florival intervjuas s-rojn Ludwig kaj Kueny en la alzaca dialekto en februaro 1990. Kasedo: 1x60 mn.
- 10) "Apprentissage des langues et Esperanto" par Dennis Edward Keefe Illinois, Etats-Unis. Pédagogue, professeur d'anglais, polyglotte. 24.2.90 au Grand Palais. En français. Kasedo: 1x60 mn.
- 11) Distra vespero kun Nikolin' okaze de federacia staĝo en Thionville 6.10.90. 60 mn. Prelego de Ivo Lapenna en Graz okaze de la Internacia Konferenco en julio 1987. 30 mn. Kasedo: 1x90
- 12) "Kiel ambasadori pri Esperanto" Prelego de Spomenka Štimek registrata okaze de la federacia staĝo en Illzach en junio 1991. Kasedoj: 2x90 mn.

Kostoj de la kasedoj afrankitaj:	90-minuta kasedo	23 FF
	60-minuta kasedo	20 FF

Vi povas mendi la kasedojn per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Federacio:

FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPÉRANTO PCK 1997 72W NANCY

Aŭ rekte per bankĉeko al mia adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio


Ni bonvole informas pri 3 nepre havindaj libretoj:

- | | |
|--|-------|
| = Proverbaro franca-esperanta (Lucien BOURGOIS)
kompletigita eldono... | 20 FF |
| = Laŭ la fluo de l'interparolo (L.B.)
konversacia gvidlibro franca-esperanta... | 10 FF |
| = Esprimaro franca-esperanta (L.B.) | 45 FF |

Haveblaj ĉe "Cercle Amical Espérantiste", F-47470 BEAUVILLE
(la prezoj ne entenas la sendkostojn)

LA GAZETO F-55210 CREUE


abono:
140 FF



Tutcerte vi jam posedas "T-ĉemizeton" (ĉemizeton laŭ "T"formato!) surportante eventualan (foje mal-facile videblan) E^o-logon. Jen do "freŝbakita" modelo proponata de niaj junaj germanaj geamikoj. Mi jam akiris unu... Mi povas aserti, ke ĝi okulfrapas!

Mendu 1 (aŭ 2!) ĉe: Germana E^o-Junularo, Rheinweg 15,
* P. Denis DW-5300 BONN 1

Prezo: 15 DM
Sendokosto
por Francio: 5 DM
(se vi mendos 10:
unu kostas nur 12DM)
Statur-talio:
M, L, XL (grandega!)



? u distra angelo



KRUCVORT-ENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

HORIZONTALE

1 kuracigaj konusetoj. 2 ne tute preciza - cifero-sufikso - bulkopeco. 3 ekskluzivi(r) - pufigi kusenon(r). 4 arbo kun maĉfrukto(r) - korinklini - taksi relativan valoron de io. 5 tritermo - trunkvila stato de l' animo. 6 esperanta litero - malmola ŝtonego(r) - siglo de UEA-servo - komenciĝo de rinito. 7 larĝa zono el teksaĵo(r) - esprimi sian kontentecan al iu(r) - ricevi provizore ion kontraŭ pago. 8 rilata al ne deca esprimo - arto (r). 9 kanalo por malpuraĵoj - osto. 10 rilata al cifero - leĝere freneza - parto de scienco pri birdoj. 11 multifaceta kuracejo. 12 parto de metafiziko.

VERTIKALE

1 aparato por studi la lumon. 2 mamulo - rokopeco - elstaraĵo ĉe fasado(r). 3 parto de rompita korpo(r) - specifa poezio- vertikale granda(r). 4 scienco de la maroj. 5 vestaĵfermilo - seka bruo - korpoparto(fonetike) - 6 sufikso - mamocentro - karesinflui(r) - parto de lokomotivo. 7 rilata al varmomezurilo - sufikso. 8 grupe - fama greka litero (inverse) - egipta kadavro - pronomo. 9 fortikaĵo(r) - oleumi(r). 10 homo trafita de duondebileco(r) - metalo. 11 kuglego - interjekcio - nedifina pronomo - koro de elektrona tubo. 12 teritorioj de juraj instancoj.

SILAB-ENIGMO

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj vort-eroj, malkovru vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon.

- | | | |
|----|-----------------|---------------------------|
| 1 | + - - + - - | surtera maolusko |
| 2 | + - - + - - - - | ano de famili-reg-sistemo |
| 3 | + - - + - | preme malgojiga |
| 4 | + - - + | senpatr(in)a knabo |
| 5 | + - - + - | plurkarpela frukto |
| 6 | + - - + - - | pacience toleri |
| 7 | + - - + - | eluzi per frotado |
| 8 | + - - + - - | Frigia dio |
| 9 | + - - + - | agrable eksciti |
| 10 | + - - + - | orientlanda kalkulilo |
| 11 | + - - + - - | semajntago |
| 12 | + - - + - | islama princitolo |
| 13 | + - - + - | afrika mamulo |
| 14 | + - - + - - | stilfiguro |

Ni rid(et)u...

Iu virino atente legas la aŭgurojn de l' horoskopoj en la taga gazeto:

"Kia bedaŭrindaĵo! Jes, vere bedaŭrinde!

- Kio estas bedaŭrinda?, informiĝas la edzo.

- Laŭ la hodiaŭaj aŭguroj, se vi estus naskiĝinta du tagojn pli malfrue, vi estus bela, inteligenta, spritema kaj amema!..."

SOLVOJ de la lastaj enigmoj: SILABENIGMO: "Amo plej sincera neniam rompiĝas"

KRUCVORT-ENIGMO: trobadoro um uvulo rivele bastilo mam nebulo ordeno ekart mn sonor do-likocefalo ol atalja knos solecismo bal otari ekimozo roĵo kritikoj ink to ozo kred tipoj bojkoto